



Enhavo

- La Zamenhof Festoj – du ekzemploj
- 14 ĉinaj provincoj prelegas
- UEA subtenas per salutoj
- Bialistoko festis – trovu filmon

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2020-57 sendita el Budapeŝto, la 14an de decembro

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkröĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

Zamenhofa festado tra la tuta Ĉinio kun AMO 71

ĈEL organizis virualan Zamenhof-festan tutlandan kunvenegon en la 14a de decembro. Ĝi havis la temon “En 2021 kiel kreive antaŭenpuŝi la Esperanto-movadon”. Feliĉe ĈEL konsentis, ke tiu kunveno samtempe iĝu la 71a Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO).

La programo de la malfermo estis jena:

Salutas Yu Tao, vicprezidanto de Ĉina Internacia Eldona Grupo,
vicprezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo

Salutas Duncan Charters, prezidanto de UEA kaj So Jinsu, estrarano.

Enkonduko -- Stefan MacGill, respondeculo de AMO kaj la Landa Agado de UEA (tiu pri-Azia prezentaĵo estas alkröĉita).



La kunsidestro estis s-ino Chen Ji, la direktoro de *El Popola Ĉinio* kaj komitatano A de UEA por ĈEL). Jen foto el antaŭa konferenco.

Jen la tuta programo:

1. Plibonigi kaj fortigi lokajn Esperanto-organizaĵojn por antaŭenigi la disvolviĝon de Esperanto-movado en Ĉinio

(Wang Minhao, Ŝanhajo, honora prezidanto de Ŝanhaja Esperanto-Asocio)

2. Nova rolo de Esperanto-Asocio en E-movado --laŭ kazo “Teo, Amo kaj La Mondo”

(Zhang Yongle, Pekino, Sekretario de Pekina Esperanto-Asocio)

3. De ideoj al agoj, kion ni devas fari?

(Zhou Tianhao, Ŝanhajo, prezidanto de Ŝanhaja Esperanto-Asocio)

4. Provetado pri praktikaj regionoj en Esperanto

(Zhang Changsheng, Jiangsu-provinco, prezidanto de Changzhou-a Esperanto-Asocio,)

5. Bonigi, Interkomunigi, Disvastigi

(Zhang Wei, Liaoning-provinco, vicsekretario de Ekonomia kaj Komerca Komisiono de ĈEL)

6. Aktivigu Instruadon per la interreto

(Chen Zaiwei, Hainan-provinco, vicprezidanto de Hainan-a Esperanto-Asocio)

7. Prezento pri Ĉina Junulara Esperanto-Asocio

(Gao Shuyuan, Pekino, prezidanto de Ĉina Junulara Esperanto-Asocio)

8. Plano por instruado de la Ĉina lingvo en Esperanto

(Song Ping, Heilongjiang-provinco, sekretario de Heilongjiang-a Esperanto-Asocio)

9. Pasinteco kaj Estonteco: Nia asocio

(ĉine, Ling Bo, Anhui-provinco, sekretario de Anhui-a Esperanto-Asocio)

10. Rekomencis la Longa Marŝo de Esperanto

(ĉine, Lju Rutong, Fujian-provinco, sekretario de Xiamen-a Esperanto-Asocio)

11. Insistas tradicion kaj serĉas novan manieron de Esperanto

(ĉine, Yuan Yongming, Shaanxi-provinco, sekretario de Xi'an-a Esperanto-Asocio)



12. La Avantaĝo de Esperanto en kunlaboroj inter kulturoj kaj ekonomio

(ĉine, Bai Risheng, Interna Mongolio, sekretario de Esperanto-Asocio de Interna Mongolio)

13. Saluto el Hubei-provinco

(ĉine, Wang Guiying, Hubei-provinco, sekretario de Hubei-a Esperanto-Asocio)

14. Nuntempe Esperantaj organizoj devas intensigi esploradon pri aplika taktiko

(ĉine, Wang Letian, Jiangxi-provinco, sekretario de Jiangxi-a Esperanto-Asocio)

Memoru, ke ĈEL estas signife la plej granda Landa Asocio en UEA, kun JEI en Japanio en la dua loko. Legu pli pri tio en la alkroĉita PDF-dokumento.

ZAMENHOFA-FESTADO

Estas tro da Festadoj tra la tuta mondo por menci tiujn. Sed jen ero el la establo-loko de Zamenhof, kaj efektive de Esperanto. Tion agnoskis la Universala Kongreso de UEA en 2009.

Bialistoke – establo-loke

la filmo pri la ĉi-jaraj Esperantaj Tagoj de Krakovo prezentita dum Bjalistokaj Zamenhof Tagoj spekteblas en jutubo: <https://youtu.be/LoJi58ItSQ>

Ĝi ne estas perfekta ĉar ni kreis la filmon dum tre mallonga tempo pro baldaŭa limdato ricevinte de organizantoj proponon kontribui al la Z-Tagoj. Tamen, espereble ĝi estas bona memoraĵo kaj helpas iom popularigi tiun aranĝon kaj la lingvon internacian.

Adam Wilkus

Fotoj: Scenoj el la Universala Kongreso en 2009



===== Vortoj: 495 =====

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikiloj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikiloj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.